Protokolo de la estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo
ĵaudon la 15-an de februaro 2024 per Zoom

Ĉeestis Bård Hekland, Jardar E. Abrahamsen, Claude Rouget, Lars Sandbakk kaj Marianne Lund.

1. Aprobo de la tagordo
La tagordo aprobiĝis kun prokrasto de kelkaj punktoj.

2. Trarigardo de la protokolo de la pasinta estrara kunveno la 11-an de januaro 2024
La protokolo de la pasinta kunveno aprobiĝis.

3. Stato de Esperantonia
En Esperantonia necesas ampleksa purigado, eble helpe de profesia firmao. Antaŭ tio ni ordigu la ejon kunlabore kun la klubo de Oslo. Nuntempe la klubanoj regule malplenigas la poŝtkeston.

Ni decidis luigi al Boligsameiet Knut Alvssons vei 1-9 la kunvenĉambron por ilia jarkunveno en aprilo, kondiĉe ke la klubo de Oslo povos respondeci pri ŝlosilo kaj aliaj praktikaĵoj.

Esperantonia ne plu estu en la tranoktolisto Pasporta Servo.

4. Asisto al Douglas
Ni daŭrigu la regulan kontakton kun Douglas en Hurdal helsetun. Marianne esploros, kiel funkciigi la komputilon, kiun li havas tie. Lia persona telefona baldaŭ funkcios.

5. Retpoŝtaj mesaĝoj al NEL
Marianne legas, respondas kaj plusendadas retmesaĝojn. Ni forlasu aŭ malabonu pasivajn kaj neaktualajn grupojn kaj eventuale funkciigu pli efikan spam-filtrilon.

6. Kasistaj rutinoj – Prokrastita

7. Norvega Esperantisto
En la marta (1/2024) kaj sekvaj numeroj ni konservu la kolorojn kaj ĝeneralan aspekton de n-ro 3/2023. La redaktoro (Claude) intencas aperigi pli da materialoj en la norvega lingvo kaj pli da norvegtemaj artikoloj en Esperanto. La estraro decidis kompensi necesajn elspezojn de la redaktoro (por abonoj kaj simile) per 1000 kronoj por ĉiu numero.

8. Novaĵletero
Bård informis, ke la unua novaĵletero baldaŭ estos preta. Judith faris la fasonon.

9. Printempaj kursoj
Marianne faros dunivelajn, kvarsemajnajn retkursojn de 27.02. Bård anoncos en Facebook.

10. Jarkalkulo 2023 – Prokrastita
11. Jarraporto 2023 – Prokrastita
12. Abonperado – Prokrastita
13. Grasrotmottaker – Prokrastita
14. Bitarkivo – Prokrastita

15. Venonta estrara interkonsiliĝo
La venonta estrara interkonsiliĝo okazos ĵaŭdon la 7-an de marto 2024 je 20.30.

Protokolis Marianne Lund